

Nova turo, mala al la babela turo

Philipp Sonntag

Multaj esperantistoj rigardas sin mondcivitanoj kun kosmopolita humanismo. Ili batalas por ĝi kaj terurigitaj konstatas: la homaro aplikas pli da perforto ol ĝi mem povas elteni, kaj ĝi deziras por si pli da ama atentemo ol ĝi mem donas. Sakstrato. Kion la homaro ĝis nun tiel sencespere serĉas, ne trovante ĝin?

La homaro ankoraŭ ne trovis nin. Kvankam ni kun L.L. Zamenhof jam de pli ol cent jaroj havas interesajn solvoproponojn, sed ni tamen estas preskaŭ nevideblaj. Nia plej proksima paŝo devus esti: ni rekte apliku nian scion, nian sperton al la aktualaj mondproblemoj. Tiukaze la mondo ĉirkaŭ ni supozeble rimarkos, kial ni de cent jaroj provas vekti atenton pri ni.

Konstruo de nova turo

Depost la konstruo de la Babela Turo la reciproka kompreniĝo inter la homoj laŭdire estas ĝenata. Ĉu la ĝustatempa invento de Esperanto estus ebliginta la konstruon de pli bona turo? Laŭ pure teknika kaj organiza vidpunktoj Esperanto surbaze de sia strukturo povus esti helpa instrumento por tio.

Tamen estus problema la provo, sole per Esperanto mildigi la koleron de Dio. La projekto de la turkonstruo ja estis blasfemio. Tio signifas, ke nek gravis nek gravas la potenciala efiko de la lingvo, sed ĉiam ankaŭ la interrilato kun la ĝin ĉirkaŭanta problemaro. Apud la pragmatiko decida estas konvinka interna sinteno. La unua konsekvenco devintus esti, rezigni aŭ modifi la rigidan celaron de la turkonstruo.

En moderna kunteksto

Nuntempe ni kiel homaro povas provi konstrui tute alian turon. Ni limigu la senliman ekonomian kreskadon. Ni precize konu la riskojn, ĉu de klimatajn katastrofojn, ĉu de atomaj militoj, komerca gentekniko aŭ aliaj ekzistencaj endanĝerigoj. Konklude: ni rifuzu akcepti tiajn riskojn pro nuancoj de lukso. Kaj ni metu al ni pozitivajn celojn.

Por la efektivigo de ĉi tiuj celoj ni esperantistoj disponas pri senprecedencaj rimedoj, kiujn ni tamen nur sporade perceptas kaj aplikas. Ni rimarkas kun doloro: en kia sakstrato ni troviĝas. Pro tio multaj esperantistoj retiriĝis en siajn privatajn vivojn, ili ĝuas bonvenan estetikon. Ilia socia kontribuo almenaŭ taŭgas por montri, kiel bone oni povas vivi kun Esperanto kiel nature uzata lingvo. Tio estas bona, sed ne sufiĉas.

Ekzistas aro da esperantistoj, kiuj fake establiĝis en scienco kiel ekspertoj. Pluraj el ili povas aplikati la apartajn kapablojn de Esperanto je la akutaj problemoj kaj tiamaniere serĉi fundamente novajn, prezentablajn solvoproponojn – kaj engaĝite interne de Esperanto kaj diplomatie ekster ĝi en fakaj kaj politikaj publicaĵoj. Tion ili malofte faras kaj tro malofte helpas unu la alian.

Konstruo de nova turo estus integriga, ekologia, paca kaj ĉiurilate esperiga por la estonteco de la homaro. Ĝia neeviteble artefarita moderneco povus tamen havi agrable naturan efikon. Tio estas tensio, kiun ni bone konas.

Malebligi devojiĝantajn ideojn

Nia socia rolo kiel esperantistoj envere povus esti esperplena malgraŭ ĉiuj seniluziiĝoj, kiam ni trovos kaj proponos proprajn konvinkajn, ĝis nun de neniuj faritajn solvoproponojn por tutteraj problemoj, sciante, ke artefaritaj lingvoj povas esti samgrade danĝeraj aŭ helpaj.

George Orwell en sia romano “1984” (Diana Verlag, Zürich, 1950, p. 273 ff) priskribas nekutime striktan artefaritan lingvon, nomitan “novparolo”. La potenculoj forigis nedeziratajn vortojn kaj eĉ signifojn, kiuj povus ebligi nedeziratajn pensojn. Sur paĝo 273 li mencias tiurilatan ekzemplon: kvankam la vorto “libera” ankoraŭ ekzistis en Novparolo, ĝi povis esti aplikata nur en frazoj kiel “la hundo estas libera de pedikoj” aŭ “tiu ĉi kampo estas libera de fiherboj”. En sia malnova senco ĝi ne estis aplikebla, ĉar politika aŭ spirita liberecoj eĉ ne plu ekzistis kiel nocio.

La novparolo similis al Esperanto, kiel ekz. (p. 274): „Adjektivojn oni formis per alkroĉo de la silabo “plena” al substantivo, adverbojn per alkroĉo de “maniere”. Ĉiu vorto povis per la prefikso “mal” esti transformita en sian kontraŭon, tiel ekz. “malfrida” signifis varma. La sekvo (p. 279):

“Homo plenkreskanta kun Novparolo kiel nura interkomprenilo ne plu sciis, ke ,egala’ iam havis la signifon de ,politike samrajta’’ kaj ke *libera* iam havis la kromsignifon de ,spirite libera’, same kiel homo, kiu neniam aŭdis ion pri ŝakludo, ne povas koni la koncernajn kromsignifojn de *reĝino* aŭ *turo*. Tia homo ne plu farus krimojn aŭ deliktojn, ĉar li ne havis nomojn por ili nek povis ilin imagi.”

Kun novparolo, homaro estus tro stulta por teroro, kaj tro stulta por libereco.

Suspekto kontraŭ tiuspeca “Novparolo” estas necesa. Tute alia afero estas ĝeneraligantaj antaŭjuĝoj kontraŭ nekutimaj ideoj. Tipa ekzemplo: En la inferon kun la artefaritaj lingvoj! Nur – kio propre estas „artefarita“? Fakte la akuzo kontraŭ Esperanto ofte estas artefarita. Ni do troviĝas en bona kompanio.

Sekretaj servoj malfidas al libera pensado, instinkte kaj sisteme. Ili atencoj estas mondscale observataj kaj diskutataj. Ili kaŭzas angoron kaj senesperecon. Kiukuntekste ili pli utilas ol damaĝas, ĉu en la propra ŝtato aŭ ekster ĝi, precipe koncerne sekurecon, ankoraŭ ne estas funde esplorita. En la realeco ekzistas abundo da interŝtupoj. Unu ekzemplo: Shidar Bazyar (Tagesspiegel 13.3. 2016, p. S1) pri Irano:

„Mi rimarkis, ke la homoj surstrate ne ridetas unu al la alia, ke neniuj ridas. Tion supozeble sekvigas la situacio. Kiam mi eliras el mia domo, daŭre okupiĝante pri mia kaptuko, nesciante, kiu eble venas ĉirkaŭ la stratangulon por kontroli min, ĉu mi estas vestita laŭ la leĝaj reguloj, tiam mankas al mi ĉia emo al ridado... Mi ne opinias, ke tiaj reĝimoj povas esti longdaŭraj...”

Nova tekniko kaj nova socio ŝanĝas la lingvon: Novaj amaskomunikiloj (rimedoj) kaj vivata demokratio ŝanĝas la lingvon. Ili povas efiki direkte al libereco kaj sekureco. La riskoj estas enormaj, samkiel la esperoj. Esperantistoj kaj lingvosciencistoj povas efiki konstruktive.

Lingvaj malfacilaĵoj en la sekurecpolitiko.

Atoma milito povis esti preventita nur per ekstrema klopodado. Certa limigo de armado kaj parta atoma malarmado sukcesis nur kondiĉite. Montriĝis malfacile, trovi komunan, objektivan lingvon. Nome dum la Malvarma Milito inter la usonaj ekspertoj mi trovis neniun, kiu plimalpli bone regis la rusan. La rusoj dum la intertraktoj pri malarmado laŭdevige uzis la anglan, sed nur kun videbla, rekte demonstrativa malemo. Provoj per la franca fiaskis. Do bonvolu nek la rusa, nek la angla, nek la franca – do kio? Fakte Esperanto estus ebliginta la plej naturan homan konfronton! Ĝi eble eĉ esence kontribuus al la forigo de la sakstrato de reciproka timigo.

Tio, kio finfine helpis, estis aparte primitiva planlingvo, nome kombino de la programadlingvo Algol kun matematikaj eskaladaj modeloj por atomraketoj. Tiuvoje la ekspertoj eltrovis, kiel ili ambaŭ estis altgrade endanĝerigitaj de eskalado kaj ke ili havis komunan (!) intereson je armadlimigo. Tio sukcesis nur kun granda fortostreĉo, helpe de usonanoj, rusoj, ni germanoj kaj kelkaj aliaj. Ĝi sukcesis pere de komuna konsidero de la modeloj en Pugwash-konferencoj kaj aliaj renkontiĝoj.

Harmoniscienco

La teknika progreso konstante malfermis al la naturaj kaj artefaritaj lingvoj enormajn pliampleksigojn en fundamenta esplorado kaj praktika uzado. Planlingvoj estis elegantege precizigitaj en sia sistemeco. Modela ekzemplo estas la harmoniscienco, belega fundamento por lingvo. Ĝi estis evoluigata tra jarmiloj, kaj supozeble ĝiaj komencoj sonis ŝoke akrate. Ĉu do tia evoluo estis natura aŭ artefarita? La sama demando estas ĉiam denove farata rilate al Esperanto.

Por komparo: Mi eldiris la opinion, ke kantado estas io natura, dum ĉiuj tiel genie konstruitaj muzikiloj depost 30 000 Jaroj tamen en komparo estas terure artefaritaj, ke devus esti strikte neelteneble aŭskulti iujn muzikaĵojn ludatajn per instrumentoj. Estas do komplete absurde, atribui al tia muziko la nocion kulturo. Jam la nigraj kaj blankaj klavoj de la piano malkaŝas la artefaritan, mekanikan, krudmalmolan, malrondan, ĝustadire maŝinecan karakteron de la piano. Do: en la fajron kun la piano!

Dua komparo: Ni kontemplu la diferencon inter muzikistoj kaj politikistoj. Se la muzikistoj meze de komuna koncerto senfine kverelus same furioze, necedeme kaj ĥaose pro ĉiu muziknoto, kiel ofte faras la politikistoj en la natura lingvo angla, anstataŭ muziko ekzistus nur horora grincado. Simile ne povas ekzisti sana etoso, dum ministerioj delegas siajn proprajn juristojn al klimatkonferencoj por „diplomatie defendi la proprajn interesojn“ de la nacio per lingvaĵo sugestiita de internacia juro.

Povas esti, ke daŭris 30 000 jarojn ĝis la atingo de agnoskita harmoniscienco kaj bonaj instrumentoj. Tiom da tempo ni ne havas. Ni rajtas ekmalpacienci. Ni povas reagi al la globalaj defioj pli emfaze ol ĝis nun.

Respondoj al aktualaj problemoj, per Esperanto

Ni bezonas novajn impulsojn por la pritrakto de la globalaj defioj. Kiel ni povas eluzi nian centjaran sperton kun Esperanto kaj homaranismo por la nuntempo? Mi mencias principajn defiojn, por kiuj ni povas aplikcele trovi komunajn respondojn.

1. Surbaze de la principoj: Esperanto taŭgas kiel modelo. Ekzemplo estas la eleganteco en gramatiko, vortfarado, unueco ĉe samtempa alta esprimkapablo kaj fajnaj distingeblecoj. Ĝi povus esti pli konscie vivata interne kaj pli emfaze komunikata alekstere. Centra estas la ekkono, evito kaj fine la globala forigo de arbitro. La kaŭzoj de malriĉa kontraŭ riĉa, de ekologia kontraŭ senrespekta, de sociala kontraŭ egomania estu klare montrataj.
2. En teorio kaj praktiko: Kio strukture rezultas el la tipaĵoj de Esperanto kaj homaranismo por difinitaj problemsolvoj? Kiel ni povas doni novajn impulsojn? Ekzemplo: almenaŭ principe ĉe ni ne ekzistas ksenofobio. Kia estas la sperto, ĉu ni plenumis la aspirojn de L.L. Zamenhof? Nome kiel kaj kial? Plia ekzemplo: kiel ni povas pere de la homaranismo kontraŭstarigi ion konstruivan al la agresema „Batalo de la Kulturoj“ de Samuel Huntington?
3. Interne: kiel ni povas superi la parte ĝenajn kverelojn en niaj propraj lokaj grupoj? Kiel ni do povas eviti la sensencajn vortbatalojn, la ĵaluzajn pravemojn, senutilajn konfliktojn kaj absurdajn kapricojn? Konstruiva rilato al homaranismo estus helpa.
4. En la lobiokratio: La rigora politiko de ekonomiaj kaj militistaj interesoj evidentigas ĝenerale konatajn riskojn. Monavido estas vastskale, kvankam rezignacie, malestimata en la loĝantaro. Kial la kutimaj religioj tamen ĝenerale malsukcesas? Kial la enkonduko de minimuma salajro estas tiel malfacila? Kiel la homaranismo per strikta kaj justa minimuma etiko povas vekti novajn esperojn?
5. Meze de perforto: Kiel ni povas krei turnopunkton antaŭ la fono de seninterrompa armado? Kiel ni povas atingi daŭripovan armadkontrolon? Kiel ni povas formi konfidokreajn rimedojn?

Homaranismo kiel modelo por homa konduto

Fakte ne ĉiu esperantisto akceptas la homaranismon kiel propran mondkoncepton. Mi supozas, ke ĉiu el ni almenaŭ honorigas la homaranismon kiel provon de L.L. Zamenhof direkte al etika instrukcio por la ĉiutago kaj politiko, kiel propran mondkoncepton.

Homaranismo ne estas religio. Ĝi ne postulas kredon. Ĝi estas speco de reunuigo de la religioj direkte al religieco

Skribante, ke la homaranismo elfiltras el la religio “naturan religiecon”, mi celas konstruivan etikon de konduto. Tio sukcesas pere de plejeblo evitado de eldiroj pri iuj kvalitoj de dioj kaj/aŭ diabloj.

L.L. Zamenhof scribis Deklaracio pri homaranismo (1913)

(Privata propono nedeviga por la homaranismo)

Mi estas homarano: tio signifas, ke mi gvidas min en la vivo per la sekvantaj principoj: (principo I ... IX)

X a) La plej altan por mi ne kompreneblan Forton, kiu estas la kaŭzo de la kaŭzoj en la mondo materia kaj morala, mi povas nomi per la nomo „Dio“ aŭ per alia nomo, sed mi konscias, ke la esencon de tiu Forto ĉiu havas la rajton prezenti al si tiel, kiel diktas al li lia prudento kaj koro aŭ la instruoj de lia eklezio. Neniam mi devas malami aŭ persekuti iun pro tio, ke lia kredo estas alia ol mia. (... plus X b) kaj c)

Homaranismo distingas inter profana arbitro kaj sankta kulturo.

La sekvo: el en sia kerno komprenataj mistikuloj trofervoraj fundamentalistoj fariĝas frenezigintaj aktoroj, kiuj forlasis sian amatorecan scenejon kaj moviĝas inter la publiko kvazaŭ en karnavalaj kostumoj.

Natura, vaste akceptata religieco povas esti nur tio, kio estas komuna al ĉiuj religioj. Naturaj moroj kaj kutimoj, kiel ekz. meti homon ĉe naskiĝo, geedziĝo, morto ktp. en ekzistencian kuntekston kaj amoplenan akompanion, tio estas io natura. Tian ceremonion kristano foje povu senrezerve festi en moskeo – kaj inverse “ad maiorem dei gloriam” (“je la pli alta gloro de Dio”).

Estas nia defio, moderne apliki Esperanton kaj homaranismon. Estas belega tasko, ĉar ni devas post la Zamenhofa instruo ne denove inventi la solvon, sed “nur” ĉiam denove konkrete kaj kompreneble apliki kaj bone klarigi ĝin. Tio estas farebla. Kiel engaĝita laboro ĉe pli bona konstruo de turo ĝi estu por ni plezuro.

Aktuale la “moderna” homo pli forte suferas, ol se li sekvus sian naturan religiecon, precise formulitan de L.L.Zamenhof:

“Ni sentas la ekziston de Dio kaj lian voĉon en nia konscienco:
Amu vian proksimulon tiel, kiel vi volas esti amata.”

Resumo www.philipp-sonntag.de

d-ro Philipp Sonntag, nask. 1938 en Halle/Saale. Studado de fiziko (disertacio pri sekvoj de nuklea milito), de politikaj sciencoj kaj nacia ekonomio, diplomo por reklama tekstado, 1964-1978 kunlaboranto de Carl Friedrich von Weizsäcker. 1979-1986 en WZB Berlino ĉe Karl Deutsch, 1986-2000 ĉe VDI/VDE-IT kaj 2002-2007 aktiva kompaniano en entreprenoj, speciale pri la bionika segilo. Libroj pri tekniko kaj socio, ekz. pri nukleaj danĝeroj, informsocio, armado kaj ekonomio. En la lastaj jaroj: beletro kiel ĉefaĵo – satiraj poemoj, noveloj, biografioj. Detale vidu (germanlingve) www.philipp-sonntag.de. Alinome: "Zeitmaschinennavigator "Phila" de la www.c-base.org en Berlino.